BELA RAKONTO

(Am Dm7 G7 CM7 F7M E7+4 E7)
Am Dm7 G7 C7M
Estas bel’ roman’, estas bela rakont’
F7M F6 E7+4 E7
Estas hodiaŭa romanco
Am Dm7 G7 C7M
Li hejmeniris norden al nebulland’
F7M F6 E7+4 E7
Ŝi direktiĝis al la sudo, la sudo !

Am Dm7 G7 C7M
Ili renkontiĝis ĉe vojflanko
F7M
Sur la ferio-aŭtostrado
F7M
Verŝajne estis ŝanco-tago
Am Dm7 G7 C7M
La ĉiel estis manatingebla
F7M
Donaco de la providenco
F7M Em7 Dm7
Nu kial do pensi pri morgaŭo
E7



Ili sin kaŝis en tritikkampego
Nerezistante al deziro
Inter si diris siajn ekajn vivojn
Estis daŭre nur du geknaboj, geknaboj

Kiuj renkontiĝis ĉe vojflanko
Sur la ferio-aŭtostrado
Verŝajne estis ŝanco-tago
Kaj en mankavo plukis ĉielon
Kiel plukas ni providencon
Rifuzante pensi pri morgaŭo

Estas bel’ roman’, estas bela rakont’
Estas hodiaŭa romanco
Li hejmeniris norden al nebulland’
Ŝi direktiĝis al la sudo, la sudo !

Ili disiĝis apud vojflanko
Sur la ferio aŭtostrado
Jam nun ĉesis la ŝanco-tago
Do ili ambaŭ reekvojiris
Kaj salutis la providencon
Mansignante unu la alian

Li hejmeniris norden al nebulland’
Ŝi direktiĝis tien for al sudo
Estas bel’ roman’, estas bela rakont’
Estas hodiaŭa romanco

E-o paroloj : Pierre Thévenard